



الحقوق اللغوية  
ЯЗЫКОВЫЕ ПРАВА  
DERECHOS LINGÜÍSTICOS  
DROITS LINGUISTIQUES  
语言权 LINGUISTIC RIGHTS



## **Universala Esperanto-Asocio, UEA**

Alparolo dum la 6-a sesio de

Ekspertaj Mekanismoj pri la Rajtoj de Indiĝenaj Popoloj (EMRIP)

Temo: Studo pri la aliro al justeco en la antaŭenigo kaj protektado de la rajtoj de indiĝenaj popoloj

Palaco de Nacioj, UN, Ĝenevo, 8-12 julio 2013

Sinjoro Prezidanto, Gesinjoroj, karaj partoprenantoj, saluton! Toa ó bari! Aloha! Good afternoon! Jó napot kívánok! Здравствуйте!

Mi nomiĝas Stefano Keller, mi reprezentas la tutmondan asocion de la defendantoj de lingvaj rajtoj, Universalan Esperanto-Asocion, kies membroj utiligas, ekde pli ol 125 jaroj Esperanton, la lingvon justan kaj neŭtralan por la interetna komunikado, por ebligi egalecon inter la parolantoj.

Kadre de la temo de la tago: studo pri la aliro al justeco en la antaŭenigo kaj protektado de la rajtoj de indiĝenaj popoloj, mi ŝatus prezenti tipan ekzemplon de problemoj aperantaj dum la aplikado de la leĝoj pri lingvoj.

Laŭ la Deklaracio de Unuiĝintaj Nacioj pri la rajtoj de indiĝenaj popoloj:

Artikolo 13

1. La indiĝenaj popoloj havas la rajton revigligi, utiligi, evoluigi kaj transdoni al la sekvaj generacioj siajn historion, lingvon, parolajn tradiciojn, sian filozofion, siajn skribsistemojn kaj literaturon, same kiel elekti kaj konservi siajn proprajn nomojn por nomi la komunumojn, la lokojn kaj la personojn.

2. La Ŝtatoj devas certigi la efikan protektadon de tiuj rajtoj kaj certigi ke la indiĝenaj popoloj povu kompreni kaj estu komprenataj okaze de politikaj, juraj kaj administraciaj proceduroj, provizante, se necese, interpretajn aŭ aliajn adekvatajn servojn.

Bedaŭrinde, eĉ en ŝtatoj havantaj pozitivajn leĝojn pri la uzo de la lingvoj de indiĝenaj popoloj, la praktika realigo de lingvaj rajtoj estas nekompleta. En la kazo, kiun mi nun prezentas al vi, temas pri civitano de Svedio, membro de la indiĝena komunumo Samea. Laŭ la sveda lingvo-leĝo, li havas la rajton uzi sian gepatran lingvon en la kontaktoj kun publika aŭtoritato parole aŭ skribe, kio ĉi-kaze estas la oficejo de socia asekuro. Tiu persono kontaktis nin por prezenti siajn malfacilaĵojn por povi praktiki siajn rajtojn kiujn la leĝoj de la lando garantias al li. Fine de aprilo li sendis skriban peton al tiu oficejo en la sama lingvo por ricevi simplan samea-lingvan dokumenton. Sed, anstataŭ ricevi adekvatan respondon al sia peto, li ricevis nur malfruajn respondojn, kiuj re-atentigis lin pri la lingvoj utiligendaj en liaj korespondadoj: la sveda aŭ la angla, spite al ekzistantaj leĝoj. Kaj eĉ du monatojn post la unua petskribo, li ankoraŭ ne ricevis adekvatan respondon de tiu publika oficejo. Temas en tiu kazo pri rompo de la lingvorajto de Svedio.

Indiĝenaj personoj ofte devas iri malfacilan kaj longan vojon, ĝis kiam ili povas respektigi siajn rajtojn, kiuj ja estas leĝe garantiataj de la ŝtato.

*Ni probable alproksimiĝas al historia momento, kiam ni devos prilabori novan version de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj, kiu inkluzivos ankaŭ la homajn devojn pri la respekto de tiuj rajtoj.*

Alia menciinda problemo pri la respekto de lingvaj rajtoj koncernas la kunsidojn de la diversaj mekanismoj kaj organoj de UN. Eĉ ĉi tie, dum nia aktuala EMRIP-sesio, kie plurokaze, dokumentoj estas disdonataj en la kunvenejo, oni povas konstati la neglekton aŭ minimumigon de la lingva aspekto.

La plimulto de la dokumentoj disdonataj aŭ surtable disponigataj ekzistas en unu nura lingvo, la angla. Tio estas neakceptebla en la funkciado de organizaĵo, kiu pretendas esti tutmonda. La tuta mondo ne parolas nur la anglan lingvon kaj UN havas ses oficialajn lingvojn el la 6'000 ekzistantaj en la mondo. Do, pro respekto almenaŭ al la denaskuloj de la 5 aliaj oficialaj lingvoj, tiu minimuma justeco devus esti respektata ĉi tie.


*Parolante pri internacia organizaĵo kaj pri la rilatoj inter ŝtatoj, mi ŝatus mencii la ekzemplon de la Registaro de Indonezio, kies reprezentanto, S-ro Pribadi Sutiono anoncis dum la antaŭ nelonge okazinta Indonezia Esperanto-Kongreso, ke Indonezio intencas enkonduki la instruadon de Esperanto en la studprogramon de la formado de diplomatoj. Nia organizaĵo, Universala Esperanto-Asocio vigle gratulas la Registaron de Indonezio por tiu decido pionira!*

La uzo de Esperanto en interretaj kontaktoj kontribuas al la konservado de la lingva kaj kultura diversecoj en la mondo, kies kreskanta malapero aktuala estas alarmiga. La uzo de neŭtrala kaj facile lernebla lingvo kiel Esperanto en la internacia komunikado signifas elmontradon de respekto al ĉiu popolo, lingvo kaj kulturo de la mondo.

La justa komunikado estos la temo ankaŭ de la 98a Tutmonda Kongreso de Esperanto, kio okazos en Rejkjaviko, Islando, venontmonate, kun partopreno de pli ol 1'000 personoj venantaj el 5 kontinentoj, 55 landoj, kiuj komprenos unu la alian sen interpretistoj, sen malfacilaĵoj, ĉar ili ĉiuj parolos Esperanton. Vi estas elkore invitataj.

Dankon pro via atento - je vous remercie de votre attention - thank you very much for your attention. Grandan dankon al la interpretistoj. Kaj jen saluto al niaj amikoj, kiuj komunikas gestolingve [saluta gesto]. 10 julio 2013.

---

 <http://www.linguistic-rights.org/sonoj/Declaration-de-l-Association-Universelle-d-Esperanto-UEA-6e-session-Mecanisme-d-Experts-sur-les-Droits-des-Peuples-Autochtones-EMRIP-MEDPA-6-Palais-des-Nations-Geneve-8-12-juillet-2013.mp3> - <http://goo.gl/iTHDW>

***Esperanto 1887-2012: 125 Jaroj de  
justa komunikado inter la popoloj de la mondo***  
Bonvenigaj vortoj al la eldonaĵo de UEA  
**"125 jaroj de Esperanto"**  
*far' Rita IZSÁK*  
**Sendependa Eksperto de UN pri minoritataj aferoj**  
<http://www.linguistic-rights.org/esperanto-125/>



[www.uea.org](http://www.uea.org) | [www.droits-linguistiques.org](http://www.droits-linguistiques.org) | [www.esperanto.net](http://www.esperanto.net) | [www.lernu.net](http://www.lernu.net)